

KIU EL VI ESTAS SENPEKA, TIU UNUA ĴETU SUR ŜIN ŜTONON
– Komentario al la Evangelio de P. Alberto Maggi OSM

Joh. 8, 1-11

En tiu tempo, Jesuo iris al la monto Olivarba. Kaj li revenis matene en la templon, kaj la tuta popolo venis al li; kaj li sidiĝis, kaj instruadis ilin.

Kaj la skribistoj kaj Fariseoj alkondukis virinon, kaptitan en adulto; kaj stariginte ŝin en la mezo, ili diris al li: Majstro, ĉi tiu virino estas kaptita adultante, en la faro mem. En la leĝo Moseo ordonis al ni tiajn ŝtonmortigi; sed kion vi diras? Kaj tion ili diris, provante lin, por povi lin akuzi pri io.

Sed Jesuo sin klinis, kaj per fingro skribis sur la tero. Kiam ili ankoraŭ demandis lin, li leviĝis, kaj diris al ili: Kiu el vi estas senpeka, tiu unua ĵetu sur ŝin ŝtonon. Kaj denove li sin klinis kaj skribis sur la tero. Sed aŭdinte tion, ili eliris unu post alia, komencante de la plej maljunaj kaj ĝis la lastaj.

Kaj restis Jesuo sola, kaj la virino staranta en la mezo. Kaj Jesuo leviĝis, kaj diris al ŝi: Virino, kie ili estas? Ĉu neniu vin kondamnis? Kaj ŝi diris: Neniu, Sinjoro. Jesuo diris al ŝi: Ankaŭ mi vin ne kondamnas; iru, kaj de nun ne plu peku”.

La evangelipeco kiun ni hodiaŭ komentarias ne travivis facile. Dum jarcentoj neniu kristana komunumo ĝin volis; finfine tiuj ĉi dekunu versegoj estis gastigataj de la Evangelio laŭ Sankta Johano, sed, efektive la evangelipeco apartenas al Sankta Luko, la stilo, la temaro, la gramatiko, ĉio apartenas al Sankta Luko.

Kaj se ni, fakte, ĝin forprenas de la Evangelio laŭ Sankta Johano, ni vidas ke la rakonto de Sankta Johano fariĝas pli glata, kaj se ni, male, ĝin enmetas en la Evangelion laŭ Sankta Luko, ĉe la ĉapitro 21a versego 38, ni vidas ke tiu estas ĝia kunteksto.

Kial tiu ĉi evangelipeco ne travivis trankvile? Eĉ Sankta Aŭgusteno plendis pro la fakto ke kelkiuj forprenis ĝin de iliaj evangelioj, pro kio ili timis? Ili timis ke la sinteno de Jesuo al la adultulino, ĉar pri tio temas, pri la pardono de la adultulino, kaj ke la vortoj de Jesuo “iru, kaj de nun ne plu peku” estu permeso peki.

Sed nun ni vidu tiun epizodon. “Jesuo iris al la monto Olivarba”, tiu estas termino kiu neniam aperas en la Evangelio laŭ Sankta Johano. “Sed ĉe la sunleviĝo”, ne matene kiel estas tradukite, kaj tiu indiko de la evangeliisto estas grava, “Li revenis en la templon kaj la tuta popolo venis al li”, do ekzistas konsento de la popolo al Jesuo, kaj tiu konsento incitas la sacerdotan kaston kaj la spiritajn gvidantojn.

“Li sidiĝis, kaj instruadis ilin”. La instruado de Jesuo ne baziĝas sur la observado de la leĝo, sed ĝi baziĝas sur la oferdonado de Lia amo. Pro tio Lia instruado ne estas trudita sed oferdonita. Kia estas la reago? “Tiam la skribistoj”, la vorto “skribisto” neniam aperas en la Evangelio laŭ Sankta Johano, “kaj la fariseoj”, kiel reago al tiu entuziasmo de la homamaso kiu aŭskultas Jesuon - kaj se ĝi aŭskultas Jesuon ĝi ne plu povas aŭskulti ilin - ili preparis por Li insidon.

“Ili alkondukis al li virinon, kaptitan en adulto”, kaj por kompreni la sintenon de la fariseoj en tiu situacio ni rememoras ke la geedziĝo en Izraelo dividiĝas en du tempojn; la unua estas la nupto, kiu okazas kiam la junulino havas dekdu jarojn kaj unu tagon kaj la junulo estas dekokjaraĝa, kaj temas pri la intertraktado de la edzina valorprezo kaj de la pagado de doto, poste ĉiuj reiras al siaj domoj, dum tiu ĉi tempoperiodo ne estas konsentite al la gefianĉoj havi iun ajn seksan rilaton.

Unu jaron poste la fianĉino estos kondukita al la domo de la fianĉo, kaj tiam okazos la geedziĝo. Nu, la leĝaro antaŭvidis ke, kiam la virino estis adultino, aŭ oni malkovris ŝin adultante en la faro mem dum la unua geedziĝa fazo ŝi estos ŝtonmortigita, se tio okazis dum la dua geedziĝa fazo ŝi estos premsufokita.

Do, ĉi tie ni havas virinon, en la senco de junulino aĝanta inter dekdu kaj dektri jaroj, kiun oni kaptis en adulto. Kaj ili diris al Jesuo: “Majstro”, jen la hipokriteco de la religiuloj, ili ne volas lerni, sed ili preparis insidon, ili volas kondamni. “Ĉi tiu virino estas kaptita en la faro mem”. - Jen la kialo de la tagiĝo, do, temis pri antaŭvidita embusko, eble ili havis indicojn - “adultante”.

Kaj ili rilatigas sin al la leĝo. La temo de tiu ĉi evangelipeco estas: “je kiu Dio kredi? Je la leĝfaranta Dio, je tiu kiu fiksas la leĝojn kaj kiu punas per mortopuno? Aŭ kredi je la Dio kreanta, je tiu kiu kreas la vivon, kiu ĝin amas kaj kiu ĝin ĝisekstreme defendas?”

“En la leĝo Moseo ordonis al ni tiajn ŝtonmortigi”, la malŝato estas profunda, “Sed kion vi diras?”

Tiu ne estas demando, ĝi estas trompo. Kiel ajn Jesuo respondos, li sin endanĝerigos; se Jesuo diras; “nu, bone ŝtonmortigu ŝin”, ĉiu tiu granda homamaso kiu aŭdis de Li novan mesaĝon pri amo kaj dolĉeco tuj forlasus Lin, se, male, Li dirus: “ne, ni lasu ŝin foriri”, ni estas en la templo, enestas la polico, kaj Jesuo estus tuj arestita.

Mi tion ripetas, la evangeliisto kiu estas Sankta Luko kaj ne Sankta Johano diras: “Ili tion diradis por Lin elmeti al provado”, ne por provi Lin. La verbo “provi” aperas tri fojojn en la Evangelio laŭ Sankta Luko, la unuan fojon ĝi aperis dum la tentado de la diablo. Do tiuj ĉi homoj tiom piaj, tiom spiritaj fakte estas senditoj kaj iloj de Satano, de la diablo, “por povi lin akuzi pri io”. Do, ili volas mortigi Jesuon..

La reago de Jesuo estas surpriza: “Jesuo sin klinis, kaj per fingro skribis sur la tero”. Kial Jesuo skribas sur la tero? Ni trovas la respondon en la libro de profeto Jeremio, ĉe la ĉapitro 17a, versego 13a, kie la profeto skribas: “Ho Eternulo, espero de Izrael! ĉiuj, kiuj forlasas Vin, estos hontigitaj, la defalintoj estos skribitaj sur la tero;”, ili estos skribitaj sur la tero. Tiu estas maniero por indiki ke ili jam estas tero, nome, ili jam troviĝas en la regno de la mortintoj, “ĉar ili forlasis la Eternulon, la fonton de viva akvo!”.

Kiu ne amas restas en la morto, kiu havas sentojn pri morto, tiu jam mortis. Tiam la profeta ago de Jesuo kiu skribas sur la tero indikas ke Li ilin enskribas en la regno de la mortintoj, ili jam mortis. “Tamen ĉar ili insistis kaj ankoraŭ demandis Lin, li leviĝis, kaj diris al ili: Kiu el vi estas senpeka, tiu unua ĵetu ŝtonon” - ne “la ŝtonon” - “sur ŝin”.

La evangeliisto memorigas la manieron plenumi la ŝtonmortigojn. La mortigoton, ĉi kaze la mortigotinojn oni metis en fosaĵon, oni ĵetis en kavaĵon, kaj unu el la atestantoj pri kulpo devis ĵeti ŝtonon por ŝin trafi ĉe la koro kaj ordinare tiu ĉi ŝtono mortigis ŝin. Temis pri sufiĉe peza ŝtono.

Do, Jesuo diras “kiu kuraĝas ŝin mortigi?”, kiu estas senpeka, tiu efektivigu la komdamnan verdikton. Do, temas pri efektivigo de kondamna verdikto. “Kaj denove Jesuo sin klinis kaj skribis sur la tero”, evidente la listo estis longa.

Estas interesa afero, manko en ĉio tio. Kie estas la viro? Tiuj estas fervoruloj pri defendo de la leĝo - La leĝo, la libro de Readmono antaŭvidas ke, okaze de adulto, ankaŭ la viro estu komdamnita kaj ŝtonmortigita, sed la viro ĉikaze ne ĉeestas. La viro sin savas: en leĝo farita de viroj, la viroj ĉiam havas la saveblecon.

Do, denove Jesuo sin klinas kaj skribas sur la tero. “Tiuj ĉi aŭdinte tion, eliris unu post alia”, en la komenco ili estis solidaraj inter si, kiam temis pri akuzo, nun, kiam temas pri forkurado ili foriras senbrue unu post la alia, “komencante de la plej maljunaj”.

Tiu “maljunaj” ne signifas ‘la maljunuloj’. La greka termino πρεσβύτες, (maljunulo) indikas la sindedrianojn, la sindedrio estis la plej alta jura organo en la tiutempa Izraelo, “Kaj restis Jesuo sola, kaj la virino staranta en la mezo”. Kaj jen la surpriza kaj skandala sinteno de Jesuo kiun la kristanaj komunumoj ne akceptis: “Tiam Jesuo leviĝis, kaj diris al ŝi: Virino, kie ili estas? Ĉu neniu vin kondamnis? Kaj ŝi diris: Neniu, Sinjoro”.

Sankta Aŭgusteno, komentante tiun evangelipecon uzas belegan esprimon, li diras: “restas la mizerulino kaj la mizerikordo”. Kaj jen Jesuo la ununura en kiu ne estas peko kiu diras al ŝi: “Ankaŭ mi vin ne kondamnas; iru, kaj de nun ne plu peku”. Jesuo ne pardonas la virinon, la virino jam estas pardonita, sed Jesuo komunikas al ŝi la forton por rekomenci vivi.

Nu, tiujn ĉi dekunu skandalajn versegojn neniu kristana komunumo akceptis dum jarcentoj, kaj, verŝajne, estas malfacile kompreneblaj tiu pardono, tiu akcepto kaj tiu amo flanke de Jesuo...